

Noto „nekontentiga” por germanaj lernejoj



Metio kaj formo



Neniu konsolo

**Kapti la sekundon,
kiu neniam revenos**

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Neniu konsolo

En 1993 la japana registaro agnoskis la ekziston de tiel nomataj konsol-virinoj, kiuj servas japanajn militistojn dum la dua mondomilito kiel seks-sklavinoj. Tamen lastatempe la nova japana ĉefministro, Shinzo Abe, neis ilian ekziston.



KATHERINE HALLA

Noto „nekontentiga” por germanaj lernejoj

En 2000 estis ekzamenata precipe la legkapablo de 15-jaraĝuloj; en 2003 matematiko; en 2006 natursciencoj. En ĉi-lastaj testoj partoprenis 57 ŝtatoj el ĉiuj kontinentoj kaj entute 275 000 gelernantoj. La rezultoj en Germanio ne kontentigis. Evidentiĝis, ke infanoj ofte ne komprenas, kion ili lernas. Ŝajnas, ke instigas ilin notoj kaj la venonta testo anstataŭ scivolo kaj intereso.

Kapti la sekundon, kiu neniam revenos

En la dua artikolo de nia serio pri fotantoj ni prezentas al vi la meksikan foto-amatoron Alejandro Mejía Greene. En la grandega foto-arkivo de Flickr (www.flickr.com) la verkoj de Alejandro (kiu tie uzas la pseŭdonimon Júbilo Haku) troviĝas inter la plej elstaraj. Pli ol 70 fotoj liaj atingis la unuajn paĝojn de la retejo, fakto, pri kiu multaj aliaj foto-amatoroj nur revas!



Metlo kaj formo - tradicio kaj progreso

Lastatempe okazis en iamaj metiejoj la kvara tia ekspozicio en Andelsbuch kun 98 kontribuantoj, el kiuj oni honoris per laŭdoj kaj premioj ĉirkaŭ la trionon. La ĵurio klarigis sian verdikton en modernstila pavilono el normaj EU-paletoj, portempa centra konstruaĵo de la ekspozicio.



KORRUFOTO: ALEJANDRO MEJÍA GREENE

9

POLITIKO

Aŭstrio 8

Modela lernolibro

Eŭropa Unio 8

Dialogo unudirekta

MODERNA VIVO

Virinoj 9

Neniu konsolo

Instruado 10

Noto „nekontentiga” por germanaj lernejoj

EKONOMIO

Ĉinio 11

Eksterlandaj investantoj rapide aĉetas nemoveblaĵojn

Kroatio 12

Kiel oni (trans)vivas en Kroatio

Litovio 13

Problemo pro salajroj

FOTOGRAFADO

Alejandro Mejía Greene 14

Kapti la sekundon, kiu neniam revenos

SPIRITA VIVO

Italio 16

Ĉu vere okazis sang-oferaĵoj?

Gratulinda bulgara iniciato 17

Invito al diskuto 18

Kio estas spiriteco?

ARTO

Metlo kaj formo - tradicio kaj progreso 19

Madagaskaro 21

Kino malagasa furoras

Tri diskoj kun ses paroladoj de Ivo Lapenna 22

LIBROJ

Interlingvistiko por ĉiuj 23

Resume de l' mio 24

SERCO KAJ SATIRO

Demokratio 26

Avidaj piratoj defendas justecon

Abonoj 4

Enkonduko 5

Leteroj 6

El mia vidpunkto 7

Anoncetoj 27

10

14

19

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be (ebblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je **belga** banko en **eŭroj**. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifo

Ŝtato de la paganto		MONATO		La Jaro aere	
		surface	aere	1 fojon monate	tuj
Argentino	EUR	23	26	5	9
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	56	5	9
Brazilo	EUR	23	26	5	9
Britio	GBP	32	35	4	6,5
Bulgario	EUR	23	26	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	26	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongo	EUR	41	45	5	9
Hungario	EUR	23	26	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	45	5	9
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6900	7300	860	1260
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	45	5	9
Kroatio	EUR	23	26	5	9
Latvio	EUR	23	26	5	9
Litovio	EUR	23	26	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	390	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugalia	EUR	37	41	5	9
Rusio	EUR	23	26	5	9
Singapuro	EUR	41	45	5	10
Slovakio	EUR	23	26	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	46	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	74	81	9	14
Tajvano	EUR	41	45	5	9
Usono	USD	61	65	8	13
Baza tarifo	EUR	46	50	5	9

Prezo de la retaj versioj (askia, unikoda aŭ PDF): 60% de la surfaca tarifo.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelsö, 5 Craighill Road, Kincadzw, CARLUKE ML8 4QT, Tel. 01555 759 166. Reto: davekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto MONATO: 07001. Reto: cea.polnicky@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoficejo@esperanto.fi
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - **Hilde** Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
 - **Literatura-Servo "Espero"**, Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo.ESPERO@t-online.de.
 - **Hans** Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - **Wolfgang** Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japania:** Japania Esperanto-Instituto, Waseda, 1-2-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@iei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miamiau1@ice.co.cr
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiust@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8042. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
 - **Halina** R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - **Mikaelo** Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
 - **Esperanto-Skolan**, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - **Sveda Esperanto-Federacio**, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleeodorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 28a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopio: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobia@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Noto:** Librecozinojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net..
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Sherco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Dikeco



Mi plidikiĝis. Dum jardekoj mi tenis mian ideal-pezon laŭ la formulo „alto en centimetroj minus 100 minus 10 elcentoj”. Sed ekde pluraj jaroj ade mi plipeziĝis kaj nun havas 10 kilogramojn pli. Tio mirigas min, ĉar mi tute ne ŝanĝis miajn vivo- kaj manĝo-kutimojn. De multaj jardekoj mi manĝas ekzemple malmultan grason, ĉiam mi movis min biciklante ĉiutage unu horon kaj ofte marŝante. Jes, nun mi estas pensiulo kaj eble ne plu havas tiom da streĉo, kiom dum la deĵora periodo. Mia edzino asertas, ke kulpas la biero. Estas vere, ke mi ŝatas la bonan bavaran bieron, kiu laŭ la indiĝenoj estas ne alkoholaĵo sed – nutraĵo. Fakte bavara biero bone nutras. Sed ankaŭ antaŭe mi trinkis bieron. Kial do, finfine, mi iĝis pli dika?

Mi supozas, ke kulpas la statistiko. Laŭ freŝa esploro, du trionoj de plenkreskuloj en Germanio estas tro dikaj aŭ eĉ grasaj. Ili nun tenas inter la EU-landoj la plej altan rangon de dikeco, krome estas same dikaj kiel usonanoj. Tio ne mirigas, ĉar germanoj tradicie ne nur adoras sed ankaŭ kopias la usonan vivmanieron. Por mi mem mi povas konkludi, ke mi kun mia dikeco troviĝas en bona societo, ĉu ne? La nova statistiko tiom alarmis la germanan federacian ministron Horst Seehofer, en kies respondeco estas ankaŭ la sekcio „nutrado”, ke li tuj anoncis kampanjon por klerigi kaj informi la loĝantaron pri sana nutrado kaj instigi homojn pli multe moviĝi. Sed fakuloj, kiuj esploris tiajn programojn en multaj landoj, trovis, ke tiaj kampanjoj efikas neniom. Ili postulas tial ne plu reklami por energiriĉaj nutraĵoj, kiel tion rekomendas Monda Organizaĵo pri Sano (MOS). Sed, pardonu, estimataj MOS-moŝtoj, mi neniam atentigas reklamon de nutraĵoj kaj ekzemple eĉ ne konas reklamojn de *Makdonaldo*; mi aĉetas kaj manĝas tion, kion mi ĉiam ŝatis kaj manĝis. Konsolas min alia fakulo, kiu atentigas, ke pri dikeco kulpas precipe genoj. Efektive, laŭ multaj indicoj mi heredis precipe genojn de mia avo, kiu dum sia tuta vivo estis svelta, tamen manĝis multan grason. Cetere, mi nun ne plu havas idealan, sed normalan pezon laŭ la menciita formulo – kaj sentas min tute bone. Kion do ni lernas el tio? Eble, ke statistiko estas unu afero kaj reala individua vivo io tute alia. Dezirante al vi, ke vi ne tro dikiĝu, mi restas sincere via

Stefan MAUL

La tri turoj de MKC (2)

Aldone al la kredebla analizo de Ian Fantom en lia ampleksa eseo *Kial vere kolapsis la tri turoj de MKC?* (MONATO 2007/4, p. 24-26) oni povas rimarki, ke tio ne estis la unua okazo, en kiu ŝtato komplete planas tiajn atakojn kontraŭ propraj instalaĵoj kaj akuzas aliajn pretekste por ataki ilin. Tion faris Hitler, kiam li enscenigis okupadon de radiostacio en Gliwice (Gleiwitz) en 1939, akuzis Pollandon kaj tuj atakis ĝin. Ion similan faris Sadam Husajn en 1980 kaj atakis Iranon. Tion faris Usono en 1983 per sudkorea aviadilo, en kiu estis gravaj usonanoj. Ĝi dum horoj flugadis super Sovetio en spionada misio, malgraŭ vana ripeta postulo de la sovetiaj aŭtoritatoj surteriĝi, kio finiĝis per ĝia faligo en la maron.

Unuhora programo pri la sama temo en la brita televido (*Channel-4*, septembro 2004) traktis la politikan motivon por tiu ĉi komploto. Laŭ tiu programo vicprezidanto Richard Bruce (Dick) Cheney skribis leteron al Bush antaŭ la fama 11a de septembro, en kiu li pledis, ke por etendi la usonan influon en la mondo *we need something big, like Pearl Harbor* (ni bezonas ion grandan, kiel Pearl Harbor). En Pearl Harbor okazis la atako, kiu komencis la militon kontraŭ Japanio en la dua mondmilito.

Husejn AL-AMILY
Britio

La tri turoj de MKC (3)

Kiel novjorkano, kiu atestis la detruon de MKC, mi ĉagreniĝis vidi, ke MONATO presis sensencan artikolon (MONATO 2007/4, p. 24-26) pri konspiriteorioj. Tiu artikolo baziĝas sur la vortoj de kelkaj disidentaj sciencistoj. Hazarde la „teorio”, ke ŝtalo ne povas fandiĝi pro petrola fajro, ĵus pruviĝis malvera per la disfalo de ŝtala ponto en Oakland (Kalifornio) la 29an de aprilo.

Krome la artikolo vere ne prezentis racian politikan klarigon, kial la usona registaro dezirus preni la vivojn de kelkaj el la plej bonaj respublikanaj subtenantoj de George Bush, kiuj laboris en la turoj. Ĉu preteksto por la milito en Afganio? Evidentiĝis, ke Bush ne bezonis pretekston por militi en Irako.



Por informoj de veraj inĝenieroj pri la disfalo de la turoj, bonvolu vidi *wtc.nist.gov*. Eble ĉiam restos kelkaj misteroj pri tiu evento, ĉar, kiel ĉiu sciencisto scias, oni neniam povas klarigi ĉion. Laŭ mi pli utile estus esplori la veran kialon, kial Bush invadis Irakon.

Thomas ECCARDT
Usono

Esperanto por surduloj

Mi estas surda, kaj mi kredas, ke estas tre dezirinde, ke surdaj esperantistoj posedu mangestan interkomunikeblon. Ekzistas gestolingvo por internacia uzo nomita

„Gestuno”, sed ĝi ne estas pli ol vortaro, sen gramatiko. Ŝajnas, ke ĉiu uzanto povas libere sekvi la sintakson de la denaska lingvo, recepto por plena ĥaoso! Gesti surbaze de Esperanto en Gestuno apenaŭ eblas, ĉar tute mankas ekvivalento de la gramatikaj finaĵoj.


Mi do interesiĝis, kiam mi eltrovis, ke ekzistas gestolingvo Signuno, difinita kiel „Gestuno + Esperanto”. Mi provis esplori ĝin pere de Interreto, sed ho ve! Kvankam klare montriĝas mangestoj por la alfabeto, inkluzive de la ĉapelitaj literoj, por la cetero de la lingvo aperas nur granda aro da misteraj ideografiaĵoj sen sufiĉa klarigo, kiel realigi ilin. Eĉ en retejoj, kiuj pridiskutas Signunon, oni ne komentas tiun kodon, kvazaŭ la kontribuantoj al la diskutoj jam mem komprenas ĝin, sed por mi tio estas nepenetrebla defio.

Unu kritikanto skribis, ke kontraste al la diversaj naciaj gestolingvoj Signuno (kiel cetero ankaŭ Gestuno) ne sufiĉe ekspluatas la vidan dimension, sed nur lame sekvas Esperanton, radikon post radikoj.

Evidente ni bezonas novan Zamenhof por krei bonan kaj efikan silentan lingvon, prefere surbaze de Gestuno, kiu funkcii paralele kun Esperanto por surduloj. Intertempe mi ĝojus ricevi helpon de iu ajn, kiu povus deĉifri la simbolojn de Signuno. Por trovi retejojn, iru ekzemple al *Google* kaj uzu la serĉvorton „Signuno”.

Vilhelmo ROWE
Britio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en Monato. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta strataдрес kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de Monato. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



Kiom valoras kaptiteco?

de Paul GUBBINS

En aprilo estas liberigitaj 15 britaj mararmeanoj kaptitaj de iranaj militistoj kaj enkarcerigitaj dum preskaŭ du semajnoj en Irano. Laŭ la irana registaro, la britoj – deĵorantaj laŭ mandato de Unuiĝintaj Nacioj – kontraŭleĝe eniris iranajn marspacon, kiam ili kontrolis pro kontrabandaĵoj varŝipon. La brita registaro male insistis, ke la militistoj ne transiris permesatajn irakajn limojn.

En Irano, la kaptitoj „konfesis” antaŭ televidaj kameraoj, ke ili navigis en irana maro malpermesata. Samtempe kelkaj kaptitoj, inkluzive de la unusola virino en la grupo, leteris, agnoskante sian kulpon kaj laŭdante sian humanan traktadon en la malliberejo. Tamen evidentis, pro la kripligita kaj nenatura angla lingvo, ke la leteroj estas tradukitaj kaj diktitaj al la „aŭtoroj”.

Milita muskolo

Neatendite, la irana prezidanto Mahmoud Ahmadinejad liberigis la kaptitojn kiel „paskan donaĉon” al la brita popolo. Motivoj tiel por kapti kiel por liberigi ne estas klaraj: supozeble Irano volis protesti kontraŭ britaj armeanoj en la regiono kaj montri sian militan muskolan. Dume la brita registaro, kiu antaŭ kelkaj semajnoj decidis renovigi siajn nuklean submarŝiparon, devis noti, ke kontraŭ atencoj tiaj ne protektas nukleaj armiloj.

La brita publiko, vipata de bulvarda gazetaro, koleris kontraŭ la humiligo de la ostaĝoj. Aparte agacis fotoj pri la kaptitino, devigita konforme kun religiaj

moroj kovri la hararon. Filmetoj tamen vidigis la malliberigojn en bona sanstato, manĝantaj kaj kune konversaciantaj. Plejparte la gazetaro, indigna pro la traktado de britaj militistoj, amneziis pri la konduto de britaj soldatoj en Irako kaj aliloke, kiuj humiligis, seksperfortis kaj murdis siajn kaptitojn.



Herooj kaj malherooj

Hejmenirinte, la iamaj kaptitoj anoncis, ke ili vendos siajn historiojn al amaskomunikiloj. Raportite estis, ke la unusola virino ricevos ĝis 150 000 eŭrojn pro ekskluzivaj intervjuoj kun televido-stacio kaj gazeto. Tuj la „herooj” transformiĝis en malheroojn. Ofendiĝis i.a. parencoj de soldatoj, kiuj mortis lastatempe en Irako kaj aliloke. La profitemo de la mararmeanoj, kiuj oferis nur 13 tagojn da libereco kontraste al tuta vivo, insultis la memoron de la perditaj gefiloj, tondris familianoj.

Unue la registaro sankciis la surmerkatingon de la travivaĵoj. Ĝi argumentis,

nelogike, ke, se la koncernitoj vendos siajn historiojn, pli facile eblos determini la enhavon. Tamen post dimanĉaj gazetoj plenaj de „ekskluzivaj” raportoj, kaj post laŭtaj publikaj protestoj kontraŭ la komercismo de soldatoj relative bone salajrataj por alfronti danĝerojn, la registaro, embarrasite, subite anoncis, ke en la estonteco

(kiel fakte en la pasinteco) militistoj ne plu povos tiel riĉiĝi de siaj spertaĵoj.

Simplaj soldatoj

Tiel finiĝis evento, kiu de pluraj vidpunktoj postlasas fiodoron. Argumenteblas, ke britaj militistoj ne servu en regiono milojn da kilometroj for de la patrujo, kie ilia registaro ne enmiksiĝu en tiea politiko, kaj kie ili ludas ne defendan sed agresan rolon; argumenteblas, ke la irana registaro ne propagandocelu ekspluatado de simplaj soldatoj – aparte virinoj – farantaj foje malagrablan

devon; argumenteblas, ke la gazetaro ne ĉeklibrumu por plenigi siajn paĝojn kaj, koleriĝinta pro la sursokligo de kaptitino, mem ne sursokligu la saman liberigintino.

Tio ne signifas, ke la kaptitoj ne publiku siajn versiojn pri 13 tagoj da kaptiteco. Nepras, ke iliaj pretendoj ekvilibrigu la pretendojn de la irana registaro, i.a. ke la kaptitoj – paradokse – „plene liberis” en sia malliberejo. Sed aĉetitaj novaĵoj estas – ĝenerale – nefidindaj novaĵoj. Novaĵoj, alivorte propagando, publiko, informoj, estu libere donitaj: veraj novaĵoj, alivorte sekretoj, skandaloj, kaŝaĵoj, estu libere elfositaj. Novaĵojn vendi sendignigas aĉetantojn, aĉetatojn kaj, fine, socion. ■

Modela lernolibro



La anglalingva titolo de la aŭstra furorlibro *EU por vi ludas per la similaj sonoj de la mallongigo EU kaj la pronomo you*.

Furoras aŭstra lernolibro pri la Eŭropa Unio. Unue *EU por vi* estis eldonita en 2005 en 50 000 ekzempleroj, sed nun aperas dua, plene reverkita kaj aktualigita eldono.

Kiam la libro estis uzata en ĉiuj bazaj lernejoj kaj gimnazioj en Aŭstrio, ekestis ankaŭ eksterlanda intereso. Rezulte estas eldonitaj nun 265 000 ekzempleroj. Ekzemple, prepare por sia EU-eniro, Kroatio provizis ĉiujn gelernantojn en la devigaj lernejoj per tiu ĉi enkonduko en la celojn kaj funkciadon de la Eŭropa Unio.

Samtempe oni tradukis la libron en la slovenan kaj turkan lingvojn, kaj ĉi-momente estas preparata eldono en la estona. Cetere, pluraj aliaj EU-landoj jam esprimis interesiĝon pri la libro. Ĉiuj eksterlandaj tradukoj entenos ĉapitron pri la rilatoj en la koncerna lando al EU.

Rekomendata

En la lernojaroj 2007-2008 la libro viciĝos inter oficialaj aŭstraj lernolibroj. Ĝi estas rekomendata por la lernobjektoj „Geografio kaj Ekonomio”, „Historio kaj Sociologio” kaj por „Sociologio/Politika Klarigo” ekde la 8a klaso de aŭstraj lernejoj.

Aŭtoroj de la libro estas Wolfgang Böhm de la viena tag-ĵurnalo *Die Presse* kaj Othmar Lahodynsky de la magazino *Profil*. Ambaŭ estas spertaj ĵurnalistoj, kiuj ekde multaj jaroj verkas artikolojn pri EU.

La prezidanto de la Eŭropa Komisiono, José Manuel Barroso, karakterizis la lernolibron kiel modelon de „plej bona praktiko” pri informado. Li alvokis al EU-membroj traduki la libron kaj ĝin uzi en lernejoj.

Evgeni GEORGIEV

EŬROPA UNIO

Dialogo unudirekta

Ĉeĥa tagĵurnalo testis komisionanojn de Eŭropa Unio (EU) en Bruselo. La ĵurnalo, *Deníky Bohemia*, volis scii, kiel komisionanoj respondos al demandoj de ordinaraj civitanoj. El 27 komisionanoj respondis ĉeĥe nur du: Margot Wallström kaj Ján Figel'; angle kun senkulpigo respondis Danuta Hübner. Reagis neniu aliaj.

Antaŭ jaro kaj duono la prezidanto de la komisiono, José Barroso, lanĉis iniciaton por plibonigi dialogon inter EU kaj ĝiaj civitanoj. Evidentas, ke la atendataj ŝanĝoj ne okazis. Teorie, ĉeĥoj rajtas skribi ĉeĥe kaj ricevi respondon ĝis post 15 tagoj. Tamen kvar komisionanoj, inkluzive de Barroso, eĉ ne indikas Interret-adreson.

Sekretariino de Vladimír Špidla, komisionano pri laboro kaj sociaj aferoj, komentis: „Mi ne komprenas, kiel tio povis okazi. Ni respondas zorgeme al ĉiuj.” Ŝi promesis esplori la aferon.

Jindriská DRAHOTOVÁ



JOHN MÉS BEAUCHAMP

VIRINOJ

Neniu konsolo

En 1993 la japana registaro agnoskis la ekziston de tiel nomataj konsol-virinoj, kiuj servis japanajn militistojn dum la dua mondomilito kiel seks-sklavinoj. Tamen lastatempe la nova japana ĉefministro, Shinzo Abe, neis ilian ekziston.

Forte reagis Usono kaj Nederlando. En la usona senato oni apelaciis al Japanio oficiale agnoski la konsol-virinojn kaj ilin finance kompensi. Sed japanaj konservativuloj koleris, dirante, ke la virinoj estis nuraj prostituitinoj.

Virino, kiu dum 16 jaroj batalas por la 200 000 virinoj, ĉefe el Koreio, estas amsterdamanino Berthy Korvinus. En 1944, kiel sesjarulino en tendumejo Muntilan sur Meza Javo, ŝi vidis, kiel junaj virinoj estis perforte pelvarbitaj de la japana armea polico al bordelo en Magelang.

„tri el la virinoj iniciatis en Tokio proceson kontraŭ la japana ŝtato. Unu jaron poste, la japana registaro agnoskis la ekziston de konsol-virinoj kaj pardonpetis”

Proceso

En 1991 Korvinus ĉeestis konferencon en Seulo, Suda Koreio, kiam unuafoje prezentis sin publike la tiel nomataj jungshindeoj, alivorte koreinoj perforte tiritaj el siaj domoj por fariĝi seks-sklavinoj. Tiam tri el la virinoj iniciatis en Tokio proceson kontraŭ la japana ŝtato. Unu jaron poste, la japana registaro agnoskis la ekziston de konsol-virinoj kaj pardonpetis per letero al la koreinoj, „rekrutitaj por prostituado kaj suferintaj nepriskribeblajn fiagojn”.

En 1994 sinjorino Korvinus renkontis profesoron Yoshimi en Washe-da-universitato en Tokio. Li posedis dokumentojn el armeaj arkivoj, kiuj ne-

duboble pravas, ke ekzistis sistemeca plano pri deviga prostituado dum la dua mondomilito.


Milit-tribunalo

Cetere notis la Internacia Virina Tribunalo pri Militkrimoj de Japan-armea Seksuma Sklavigo, okazinta en 2000 en Tokio, ke la aliancanoj ne procesis kontraŭ japanaj respondeculoj dum la internacia milit-tribunalo en Tokio inter 1946 kaj 1948, „malgraŭ la fakto, ke

ili posedis pruvojn pri ĉi tiu seksuma sklavigo”.

La nuna japana ĉefministro, Shinzo Abe, admiras sian avon, kiu estas registrita kiel A-kategorio militkrimulo. Ne mirinde, ke la ĉefministro reprenas la iaman neadon pri konsol-virinoj. Subtenas lin oficiala japana raporto, publikigita en marto pasintjare, kiu asertas, ke mankas fizika pruvo pri la seksa ekspluatado de eksterlandaj virinoj.

Johan DERKS



KATHERINE HALL

Noto „nekontentiga” por germanaj lernejoj

Post 1998 okazis la tiel nomataj PISA-studoj, per kiuj kompareblas lernantoj, lernejoj kaj klerigaj sistemoj en partoprenantaj ŝtatoj. La studojn organizas la Organizaĵo por Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo (OEKE). En 2000 estis ekzamenata precipe la legkapablo de 15-jaraĝuloj; en 2003 matematiko; en 2006 natursciencoj. En ĉi-lastaj testoj partoprenis 57 ŝtatoj el ĉiuj kontinentoj kaj entute 275 000 gelernantoj.

La rezultoj en Germanio ne kontentigis. Evidentiĝis, ke infanoj ofte ne komprenas, kion ili lernas. Ŝajnas, ke instigas ilin notoj kaj la venonta testo anstataŭ scivolo kaj intereso. Kelkaj gelernantoj lernas kvazaŭ „bulimie”: ili enkapigas la lernendaĵon, parkere ĝin „elvomas” kaj post la ekzameno ĉion forgesas. Jam frue en sia lerneja kariero ili lernas trompi kaj fraŭdi.

Kontraste necesas lerni, memstare pripensi, serĉi solvojn kaj elprovi kaj kompari la rezultojn kun tiuj de aliaj lernantoj. Necesas ankaŭ libereco por

erari kaj, per la eraroj, lerni. Parkeri vortojn, frazojn, formulojn ne taŭgas por la estonteco.

Instruoplanoj

En germanaj lernejoj validas malsamaj instruoplanoj en la 16 federaciaj regionoj. Pri lerneja instruado laŭkonstitucie respondecas la koncerna regiono. Sed la PISA-studoj montras, ke en Germanio malsukcesas gelernantoj. Ĉiu 15a lernejo povas nek legi, nek kompreni simplan tekston. Plejparte ili apenaŭ povas kalkuli elementlernejajn taskojn.

La lerneja sistemo baziĝas sur selektado. Kiam lernejo havas 10 jarojn, notoj determinas, kiu eniros gimnazion, kiu mezlernejon kaj kiu restos ĉe „ĉefa” popola lernejo, la *Hauptschule*. Finfine decidus „la volo de la gepatroj”. Tamen en neniuj aliaj PISA-landoj tiom dependas lerneja sukceso de la socia deveno kaj la financa situacio de la gepatroj. Infano de riĉulo aŭ de universitata diplomito havas pli ol seso-

blan ŝancon atingi plej altajn notojn en lernejo kompare kun same inteligenta infano de laboristo.

Homaj rajtoj

Raporto de Unuiĝintaj Nacioj, publikigita en marto, indikis, ke la germana instru-sistemo, kaj aparte selektado, rompas homajn rajtojn. Gepatroj kaj lernejoj alfrontas gravajn malfacilaĵojn, kaj aparte suferas infanoj de enmigrintoj. La registaro, kaj precipe la kristanpartiaj ministroj pri kulturo, kritikis la konkludojn de la raporto. Aliflanke socialdemokratoj kaj sindikatoj akceptis la raporton kaj postulis komunan agadon por plibonigi lernejojn.

Per Interreto ordinaraj germanoj prikommentis la raporton. Iu konsentis kun la konkludoj, dirante, ke la lerneja sistemo estas „tute kaduka, malsociale kaj nefleksema”. Pliaj opinioj troveblas ĉe www.ftd.de/debatte/showthread.html?t=206.

Jomo IPFELKOFER



Kontribuojn por la rubriko *Moderna Vivo* de MONATO kunlaborantoj sendu al moderna_vivo@monato.net.

Eksterlandaj investantoj rapide aĉetas nemoveblaĵojn

Antaŭ nelonge eksterlanda investfonduso aĉetis parcelon de ĉ. 24 000 kvadrataj metroj en Ŝanhajo. Ĝi planas investi 1,3 miliardojn da ĉinaj juanoj por tie konstrui multetaĝan oficejan domegon kaj uzi la restantan parton por alia komerca celo.

Jen ekzemplo kiel en pluraj provincoj kaj municipoj de Ĉinio alilandaj entreprenoj specialigitaj en negoco de nemoveblaĵoj aĉetas terpecojn kaj memstare konstruas kaj vendas novajn domojn. Ankaŭ almenaŭ 100 famaj ĉinaj entreprenoj el la sama sektoro kunlaboras kun alilandanoj, kondiĉe ke tiuj grandkvante kuninvestas.

La ciferoj de la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio montras, ke en 2006 la eksterlanda kapitalo, kiu eniris la ĉinan merkaton de terenoj kaj domoj, atingis 8,23 miliardojn da usonaj dolaroj. Tio estas pliigo je 51,9 % kompare kun la antaŭa jaro. La Buroo antaŭvidas ke la kreska tendenco daŭros en 2007.

Alilandaj entreprenoj stimulas konkurencon

Ĉar en la pasintaj jaroj en la ĉina landinterno la domprezoj senĉese leviĝis, domkomercistoj facile gajnis profitegojn. La blinda ekspansio kaj la senorda konkurenco malbone influis la tutan socion kaj kaŭzis grandan atenton ĉe la registaro. Ekde la dua parto de 2006, la registaro praktikas severan reguligan politikon. Unuflanke la ŝtato limigas grandajn investojn kaj eliminas nebonajn entreprenojn. Aliflanke, por rompi la monopolon de la enlandaj entreprenoj, eksterlandaj entreprenoj pli facile ricevas investpermesojn. Do

estas evidente ke tiuj ludos pli kaj pli gravan rolon en unu el la plej viglaj industrioj de la lando.

Transdono de projektoj

La ŝtato multe plialtigis la grundimpostojn. Pro tio, mezaj kaj malgrandaj enlandaj entreprenoj unu post alia forlasas la origine planitajn projektojn. Por alilandaj entreprenoj estas ŝanco por rapide akiri ion. Alia faktoro estas la alta kurzo de la ĉina mono. Tio stimulas la eksterlandajn investantojn, kiuj jam delonge rezervis ĉinan mo-

non, por tuj aĉeti projekton kaj gajni altan profiton. En januaro, entrepreno el Hanzhou, orienta Ĉinio, ofertis du parcelojn en pitoreska loko kontraŭ kontanta mono. Du aŭ tri alilandaj entreprenoj tuj ligis kontaktojn.

Altaj profitmargenoj

La decidiga motivo por eksterlandaj entreprenoj estas la altaj profitoj, kiuj nuntempe eblas. Laŭ raporto, antaŭ nelonge publikigita de RREEF, investfilio de la germana *Deutsche Bank* (www.rreef.com), la malneta profitmargeno de loĝdoma projekto en Ĉinio jam atingas 20 ĝis 30 % kaj eble baldaŭ superos tiun de Usono. Pekino kaj Ŝanhajo okupis la unuan lokon, antaŭ usonaj urbegoj. En Parizo, Sidnejo kaj Honkongo la profitmargeno estas nur 4 ĝis 5 %.

Mu Binghua

Eksterlandaj investfondusoj aĉetas parcelojn en Ŝanhajo por konstrui multetaĝajn oficejajn domegojn.



KROATIO

Kiel oni (trans)vivas en Kroatio

Estas interese analizi la datumojn pri la ekonomia vivo en la Respubliko Kroatio dum la lastaj dek ĝis dek kvin jaroj. Por tio ekzistas diversaj oficialaj fontoj, i.a. la Ŝtata Instituto pri Statistiko kaj la Kroatia Ekonomia Ĉambro (www.hgk.hr). Por koni la realan staton estas necese alproksimiĝi al la ĉiutaga vivo de la „malgranda homo”.

Kio okazis en la ekonomia vivo post la demokratiaj ŝanĝoj (enkonduko de la merkata ekonomio kaj la plurpartia sistemo) en la jaro 1990 kaj post la milita periodo 1991-1995? Malgraŭ la malpliigo de la loĝantaro (nun estas 4,4 milionoj da loĝantoj), la aktiva loĝantaro pligrandiĝis je 4,3 % ĝis 1,7 milionoj. Ankaŭ kreskis la senlaboreco, de 14,5 % al 17,9 %, ĝis 300 000. Apenaŭ ŝanĝiĝis la nombro de dungitaj laboristoj kaj oficistoj inter 1995 kaj nun; ĝi restas sur la nivelo de 1,4 milionoj. Dum la sama periodo la malneta enlanda produkto (MEP) en kurantaj prezoj pligrandiĝis je 104,7 % ĝis 38 505,6 milionoj da usonaj dolaroj; la reala kresko estis 48,6 %.

Produktado stagnas

En 2005 la nivelo de la MEP je loĝanto atingis la nivelon de 1990, sed la industria produktado atingis nur 81,3% de tiu de 1990. Aliflanke, la averaĝa neta salajro en la menciita periodo pligrandiĝis nominale je 140,6 % ĝis 4376 kunaoj. La reala amplekso de la pomalgranda komerco pligrandiĝis je 81,4 %. Ekzistas do evidentaj malkongruoj inter la nivelo de la MEP je loĝanto, la salajroj, la industria produktado kaj la reala amplekso de pomalgranda komerco.

Kroatio jam de kelkaj jaroj estas laŭ nominala sumo de salajroj en la dua loko (post Slovenio) inter la transiĝantaj

landoj, sed pro la altaj vivkostoj la vivnivelo en Ĉeĥio kaj Hungario estas pli alta, ol en Kroatio. Multaj pensiuloj ne povas vivi normale pro la malaltaj pensioj. Ekzemple, la averaĝa pensio por decembro 2006 estis laŭ oficiala statistiko 1907 kunaoj (260 eŭroj). En ĉi tiu situacio amason da loĝantoj savas la „griza ekonomio” (laŭ esprimo en Kroatio), aŭ, pli bone esprime, la „nigra laboro”. Krome multaj homoj pludivas per kreditoj kaj ŝuldoj.

Ŝtataj ŝuldoj pligrandiĝas

En la jaro 2005 la pagobilanco havis negativan saldon de 9,8 miliardoj da usonaj dolaroj, en 2006 8,8 miliardoj. Ekde la jaro 1993 tiu defcito estas konstanta fenomeno. Ekonomikistoj unuavice kiel kaŭzon konsideras la ne-realisman kurzon de la kroata kunao. En la periodo 1995-2005 la averaĝa kurzo rilate al la dolaro kreskis je 13,7 % kaj rilate al la eŭro je 9,5 %. Neniu kroata registaro akceptis devaluton de la kunao kiel rimedon por sanigi la komercan bilancon.

Samtempe la eksterlanda ŝuldo okobliĝis, atingante sumon de 30,2 miliardoj da dolaroj. Kelkare la ŝuldoj superis 80 % de la MEP. Pli nefavora fakto estas la pli ol triobliĝo de la ŝtata buĝeto, kiu atingas sumon de elspezoj de 87,9 miliardoj da kunaoj. La buĝeto inkluzivas novajn kostojn, kiel sana kaj pensia asekuroj. Publika konsumado en Kroatio en la lastaj jaroj superis 50

% de la MEP, tro granda ŝarĝo por la kroata ekonomio.

Turismo, ĉefa pozitiva faktoro

Pozitivaj tendencoj videblas en la turismo. La nombro de tranoktadoj de turistoj jare kvarobliĝis ĝis 51 milionoj (inter kiuj 46 milionoj estas eksterlandanaj). La valutaj enspezoj de la turismo atingis 7,4 miliardojn da dolaroj. Okazis grandaj investoj en konstruado de aŭtoŝoseoj. Unuflanke tio kaŭzis pliajn ŝuldojn kaj ŝarĝojn, sed aliflanke estis uzitaj enlandaj laborfortoj kaj kapacitoj. La rektaj eksterlandaj investoj en Kroatio kreskis 14,2-foje ĝis 1,3 miliardoj da eŭroj, sed mankas investoj en tute novaj fabrikoj.

Kroatio tiel fariĝis lando de kontraŭdiroj. Unuflanke estas multekostaj investoj en infrastrukturo kaj aliflanke malbonaj perspektivoj por la loĝantaro. La Monda Banko riproĉas al Kroatio malĝustan disdividon de la nacia produkto. La privatigoj de 1990 perdigis kelkajn centmilojn da laborlokoj kaj kreis amason da senlaboruloj sen perspektivoj. Surbaze de privilegiaj kondiĉoj ekestis, sen multe da laboro, peno kaj mono, nova klaso de riĉuloj. Post la sanigo de la plimulto de la bankoj per mono de la impostpagantoj, sekvis ilia privatigo al fremdaj proprietuloj, kiuj transigas la profitojn eksterlanden. La bankoj allogas la loĝantaron per malaltaj interezoj (pli favoraj, ol por entreprenoj) kaj tiel kreskigas la ŝuldecon. Multaj eksterlandaj firmaoj malfermis novajn komercajn centrojn, pligrandigante la konkurencon kaj samtempe stimulant la konsumadon. Ekzemple, kroatoj havas, malgraŭ sia ekonomia malpotenco, pli da aŭtomobiloj, ol iuj ajn loĝantoj de la Eŭropa Unio, sed pli necesaj bezonoj estas neglektataj.

Zlatko HINŠT

Problemo pro salajroj

La plej grava ekonomia problemo en Litovio, kaj samtempe la plej malgaja por la popolo, estas la salajroj, kiuj altiĝas pli rapide ol kreskas la laborefiko. Tio signifas, ke la dungantoj pagas pli ol la dungitoj meritas. Ĉi-momente neniu konsilas malaltigi la salajrojn, tamen haltigo de ilia kresko estas serioza rekomendo.



Spertuloj de Internacia Mona Fonduso avertis, ke se Litovio ne solvos la kreskantan inflacion, la troan altiĝon de la salajroj kaj la daŭran buĝetan deficiton, ĝi eble alfrontos longdaŭran haltiĝon de sia progreso. En 2006 la meza salajro kreskis je 5,1 % pli ol la laborefiko. La meza malneta salajro kreskis je 17,6 % ĝis 435 eŭroj kaj la neta je 19,6 % ĝis 317 eŭroj. La pli grandaj salajroj instigis la konsumon. Tio kontribuis al kresko de la importoj kaj al pli alta deficitado de la kuranta konto.

Lastatempe la labormerkato mem diktis la kondiĉojn. Tial dungantoj unue klopodis konservi siajn laborfortojn kaj ne serĉis eblecon por altigi la laborefikon. „Dungantoj simple ne sukcesis altigi la laborefikon samgrade kiel kreskis la salajroj, ĉar ekestis malordinara situacio: multaj homoj elmigris kaj la neceso altiri plian laborforton estis urĝa, ĉar la dungantoj vastigis sian produktadon. Do ili simple devis unue akcepti la postulojn de la dungitoj, kiuj volas pli altan salajron por eklabori. Dungantoj ne sukcesis unue atingi pli grandan laborefikon kaj nur poste pagi

pli”, deklaris financa analizistino Daiva Rakauskaite.

Tamen laboristaj sindikatoj ne konsentas, ke salajroj kreskas tro rapide kaj sence. „Se kreskas profito, kreskas produktado, sekve devas kreski ankaŭ la financaj rimedoj por salajroj. Kien nun ili trafas? Statistiko montras, ke preskaŭ 80 % de la laboristoj ricevas malpli ol la oficialan mezan salajron. Samtempe la statistiko asertas, ke ankaŭ la meza salajro kreskas. Do, jen la respondo: la meza salajro kreskas pro la salajrokreskiĝo de entreprenistoj kaj manaĝeroj”, diris Algirdas Kvedaravičius, vicprezidanto de la litova sindikata konfederacio.

Vytautas Juščius, ekonomikisto de la klaipeda universitato, rimarkis, ke la laborefiko en Litovio atingas nur 40 ĝis 50 % de la averaĝo en Eŭropa Unio (EU). Dum 2006 la laborefiko kreskis je ĉirkaŭ 5 % kaj la reala salajro je 8 ĝis 15 %. „Necesus apartigi laborefikon kaj laborintensecon. Mia opinio, hodiaŭ en Litovio precipe kreskas laborintenseco: vendeja kasistino devas labori pli longe. En la situacio de efika laboro la intenseco ne devus kreski, sed dum la samlonga tempo ni devus produkti pli. Sed tio dependas de teknika ekipiĝo, uzataj teknologioj kaj

kvalifiko de laborforto. La litovoj laboras multe, sed mia slogano estus: ni ne devus labori pli multe, sed necesus labori pli racie, do pli bone organizi la laboron, uzi pli modernajn kaj efikajn laborrimedojn”.

Post tiaj diskutoj la litovoj demandas sin, ĉu la dungantoj ne frostigos la salajrojn. Financa analizistino trankviligas: „La salajroj altiĝos, almenaŭ ĉi-jare kaj sekvontjare, je ĉirkaŭ 10 ĝis 15 %. La loĝantaro ja ne kreskas, sed malkreskas, kaj la produktado disvastiĝas. Dungantoj ne povos frostigi la salajrojn, ĉar al ili mankus laborforto. Samtempe ili investos en novaj teknologioj. La mono disponigata de EU estas uzata por la disvastigo de entreprenado. La rezultojn de tio ni probable spertos nur post unu aŭ du jaroj”.

Almenaŭ estas klare, ke bastono ĉiam havas du finaĵojn. Pagante tro malaltajn salajrojn, entrepreno riskas perdi spertajn laboristojn. En okazo de tro rapida salajro-altigo entrepreno riskas bankrotiĝi. Do la sola solvo, por ke la popolo ne sentu sin perfortata, kaj por ke la lando aspektu moderna, restas investi en rimedoj, kiuj plialtigas la laborefikon.

Laimius STRAŽNICKAS kaj



ALEJANDRO MEJIA GREENE

Kapti la sekundon, kiu neniam revenos

*Tazón de la Iguana (Iguana Bowl),
en Meksikurbo*

En la dua artikolo de nia serio pri fotantoj ni prezentas al vi la meksikan foto-amatoron Alejandro Mejía Greene. En la grandega foto-arkivo de *Flickr* (www.flickr.com) la verkoj de Alejandro (kiu tie uzas la pseŭdonimon Júbilo Haku) troviĝas inter la plej elstaraj. Pli ol 70 fotoj liaj atingis la unuajn paĝojn de la retejo, fakto, pri kiu multaj aliaj foto-amatoroj nur revas!

Havi bonajn okulojn kaj rimarki ĉion, jen la recepto por esti bona fotografo. Bildo de MKC en Nov-Jorko antaŭ la fatala tago.



Kial la fotoj de Alejandro Mejía Greene estas tiel popularaj? Nu, la respondo troviĝas en la retpaĝaro de la aŭtoro mem. Admiranto skribas pri li: „Júbilo estas unu el la plej bonaj okuloj, kiujn mi konas. Liaj fotoj estas spektaklaj.” Kaj alia: „La verkoj de Alejandro estas nepraĵo tie ĉi: la perfekta kombino de belaj objektoj kun elstara grafika kapablo.”

Sub preskaŭ ĉiuj fotoj de Júbilo legeblas la indiko „ne ŝanĝita”. La bildoj do aperas, kiel li fotis ilin, sen iu ajn komputila prilaboro. Al la demando, kial por li gravas liveri neŝanĝitajn fotojn, li respondis: „La ĉefa kialo estas, ke fotado devas esti neripetebla. Temas pri la kaptado de unu sekundo, kiu neniam revenos. Se oni fotas kun la celo ŝanĝi la bildon poste, oni perdas tiun ĉi senson pri neripetebleco.” Alia admiranto de liaj fotoj skribis ĉi-rilate: „Júbilo estas unu el la malmultaj fotografaj puristoj, kiujn mi konas, ano de specio en danĝero de malapero.”

Alejandro Mejía Greene nun ĉefe uzas ciferecan fotilon de *Canon*, la novan *EOS Digital Rebel XTi* kun diseriĝo de 10,1 megapikseloj. La rezulton de la kombino „bona fotilo” kaj „lertaj okuloj” vi vidos sur tiu ĉi dupaĝo. Sed *MONATO* ja povas montri nur etan ereton de la verkaro de tiu ĉi fotanto. Pli ol 2500 vidindajn bildojn vi trovos en lia retpaĝaro <http://www.flickr.com/photos/jubilo/collections/>.



*Kapti tiun unu sekundon, kiu neniam revenos ...
Pri kio ŝi parolas? Kun kiu?*

La preferata foto de Alejandro Mejía Greene, farita en Veracruz (Meksiko), ankoraŭ per klasika analoga fotilo.



Ĉu vere okazis sang-oferaĵaj paskoj?

Laŭ itala juda historiisto tio eble okazis. Eliras el la eldonejo en tiuj ĉi tagoj en Italio libro titolita *Sangaj Paskoj. Judoj en Eŭropo kaj ritaj mortigoj* de hebredevena Ariel Toaff. Jam estas anoncitaj tradukoj al diversaj lingvoj, kaj ankaŭ jam eksentebas kultura bruoj, jen flanke de italaj judoj, jen aliflanke.

La historiisto Ariel Toaff estas filo de fama antaŭa ĉefrabeno de la roma sinagogo (inter alie, li feste ricevis papon Johano Paŭlo la 2-a dum la unua historia papa vizito al sinagogo). Per sia iniciato li intence, per historiaj metodoj kaj procedoj, esploris la fifaman akuzon al la judoj pri infanmortigo. Estas akuzoj same fama kiel trista. Laŭaserte ili mortigis kristanan infanon jen por festi sanktan oferon, jen por obskure kaj moke ripeti, per homa sango, kion kristanoj celebras en la eŭkaristio.

Juda kvartalo en Soave (Italio)

Iom da historio

Ni komencu elfore. Estas konata la historio de *sankta Simonino*: meze de la jaro 1475 fama „aĉaĵo” okazis en la urbo Trento (norda Italio). La tuta juda loka komunumo, gvidata de estimata kaj respektinda pliaĝulo, estis akuzata pri malamega infanmortigo: La viktimo estus la kristana infano Simono. Okazis proceso kaj kondamno: 15 kulpigitoj estis mortkondamnitaj kaj ekzekutitaj. De post tiam (estu dirate paren-teze) *sankta Simonino* (la itala nomo signifas Simoneton) ekĝuis kulton kiel sankta martiro; sed ĝuste tia kulto ne tute plaĉis al romaj papaj kongregacioj, kiuj malpermesis la kulton pro manko de klara neceso, ke ĝi estu festata en la tuta eklezio; sekve la kulto estis malpermesita aŭ subpremata ankaŭ en la diocezo de Trento. Sed la disputo pri la proceso, pri la juĝoverdikto kaj pri la

koncerna (sen)kulpeco daŭris plu, kun diversaj konkludoj, jen inter historiistoj ĉe kristana flanko jen inter samfakuloj judaj.

Multaj dokumentoj similas tra la jarcentoj al tiu proceso pri la tiel nomata *sankta Simonino*: ekzemple, ekde la naŭa jarcento, tiaj suspektoj kaj akuzoj pri kristanaj infanoj, laŭdire kaptitaj kaj sange oferitaj, svarmis inter la okcidentaj popoloj, precipe en germanaj regionoj, kaj kaŭzis persekutojn kontraŭ judoj, precipe dum la preparoj al la dua krucmilito en Germanio kaj Hungario ktp.

Eklezia provo je refuto

Pri tiu „onidiro” senhonoriga, la kardinalo Ganganelli kreis komisionon por vidi, ĉu io tia vere okazas kaj okazis, kaj la komisiono de ekleziuloj konkludis, ke la onidiro ne estas fondita sur seriozaj pruvoj! La sentenco estis redaktita de la kardinalo mem, kiun poste oni elektis papo sub la nomo Klemento la 14a (forpasinta en 1769). Li tiutempe estis la komisiito de la Sankta Ofico. La enketo originis el la akuzoj pri „rita murdo” kontraŭ juda komunumo en Pollando en 1759.

La historiisto Ariel Toaff

Ni revenu al nia historiisto Ariel Toaff: kion li eseeas? Jen la surprizo. Laŭ li, eblas, ke foje vere okazis sangaj paskaj (Pesach) oferoj, por kiuj viktimiĝis kristanaj infanoj! Li diras, ke li ne posedas pruvojn el historia vidpunkto, sed liaj „pruvoj” venas, kiel hodiaŭ oni diras, el la kultura antropologio, kiu inspiriĝas de la eseoj de Mircea Eliade kaj similuloj kaj de modernaj prisociologiaj studoj. La rezonado estas pli-malpli: Ĉu vere estas neeble, ke „inter tiom da persekutitaj hebreoj senkulpaj kaj silentaj, iu – pli feroce, pli malespera kaj malpli rezignacia ol la aliaj – konceptis kaj plenumis tiun



GIORGIO P.

kruuele teruran krimon de venĝo?"

Laŭ li, la 15 atestoj de krimkonfesantoj estas tro detale precizigitaj kaj samformaj por ne suspektigi la tristigan veron. Pelas al tiu konkludo ankaŭ la neokaza estiĝo de gnostikaj herezoj inter mezepokaj judoj konstante kondamnataj de la oficiala rabenaro, kiu sin turnis al la Inkvizicio por publikaj denuncio kaj puno (kiel estas definitive montrite de Gersom Scholem, fama nemulte ortodoksa berlina jud-asimilita pensisto, 1897-1982). Prosperis (kaj tio fortikigas la asertojn de la historiisto) inter mezepokaj judoj ankaŭ katastrofa kaj apokalipsa teologio, en kiu estis proponita kaj stimolata la sangofero de homoj, kiel kompenso de la maljustaĵoj altruditaj de la kristana plimulto. Helpas al la konkludo ankaŭ la fakto, ke oni forigis el la sinagogoj la subtenantojn de legitimeco de paska sangofero.

Lia argumentado etendiĝas je 300 paĝoj, kiujn povas sekvi la leganto de la libro.

Reagoj

Utilus halti ĉe la reagoj el juda medio. Ĝis nun kompetentaj judoj montras iom da embaraso, sed ankaŭ laŭdojn pro la kuraĝo de la historiisto; oni substrekas ankaŭ kiel originalan kontribuon al la historia scio (sed ne nur lia kontribuo!), ke li insistas pri tio, ke inter oficiala judaro kaj oficiala kristanaro la konataj periodoj de amikeco fariĝas pli nombraj ol tiuj de malamikeco. „Se tiuj mankus, kiel ja eblus kompreni, ke la malplimultaj minoritatoj ne forfuĝis tra la jarcentoj el Eŭropo?” Inter la nejudaj samfakuloj ne mankas ekkonsento. Estos certe interese sekvi la estontan debaton.

Se konkludi per noto trista, kiu ĉe iuj fariĝas rekta riproĉo al la kuraĝo de Ariel Toaff: oni certe ne malmemoras, ke ĉi tiun akuzon siatempe la nazioj elfosis el la mezepokaj kulpigoj je la juda popolo, kaj kiel ili misuzis ankaŭ ĉi tion por pravigi siajn kontraŭjudajn persekutojn. La historiisto tion scias kaj antaŭvidis tiajn reagojn, sed li su-



La historiisto Ariel Toaff

pozas, ke por siaj tezoj pri eventuala, malofta sanga ofero de kristanaj infanoj en paskaj ritoj li ne devas timi misuzadon de eksteruloj.

Ĉiuokaze neniu nehebrea aŭdacus esprimi dubojn kaj formuli hipotezojn similajn al tiuj, kiujn, kun prudento kaj memkritiko laŭdindaj, nun proponas al ni Ariel Toaff.

Armando ZECCHIN

Gratulinda bulgara iniciato

En aprilo 2002 la *Balkana Biblioteko* estis fondita de la verkisto Georgi Grozdev. Li estas ankaŭ estro de la eldonejo *Balkani* (Balkanio) kaj fondinto kaj ĉefredaktoro de la trimonata eldono *Literturni Balkani* (Literatura Balkanio) en la bulgara kaj angla lingvoj; tiu ĉi revuo (n-ro 1 aperis en majo 2002) estas la unua periodaĵo, kiu traktas pri la tuta balkana literaturo kaj kulturo.

En intervjuo kun redaktoro de la ĵurnalo *Duma* (Vorto) Todor Koruev en majo 2006 deklaris: „Tre gravas paroli pri interkomunikado inter la balkanaj verkistoj, ĉar ŝajne ni vere bone konas la okcidentajn aŭtorojn, sed ne konas nin mem, ni ne konas nian regionon. Pere de la *Balkana Biblioteko* okazas disrompo de ĉi tiu fermiteco. La biblioteko respondas al la hodiaŭaj defioj en la spirita kampoj, kie situas la parolo kaj la superaĵ

valoraĵoj, kiuj superkreskas la malamon kaj la antaŭjuĝojn en Balkanio. Ĝi konfirmas la noblan rolon de la verkistoj kiel ambasadoroj de toleremo kaj humaneco kaj kreas kondiĉojn por komparo kaj reciproka konatiĝo inter la bulgaraj aŭtoroj kaj tiuj el la ceteraj balkanaj landoj.”

La biblioteko estas orientita al publiko kun seriozaj kulturaj intereso, inkluzive la junulojn, kaj ĝi tenas ĝis nun konstantan prezon de po 5 levoj (egalvalore al 2,5 eŭroj) por unuopa volumo, por ke ĝi estu alirebla por kiel eble plej granda rondo de legantoj.

En la traduko, selekto kaj prezento de la aŭtoroj partoprenas la plej bonaj tradukistoj kaj kritikistoj pri balkanaj literaturoj en Bulgario. Ĝis nun estas eldonitaj 24 libroj. La unuaj tri aŭtoroj estas Nobelpremiitoj: Ivo Andrić, Giorgos Seferis kaj Odysseas Elytis. Sekvas Ljubiša Georgievski, Ismail Kadare, Izet Sarajlić, Miroslav Krleža

(du volumoj), Hristos Haĝipapas, Josip Osti, Giorgos Pieridis, Dragoslav Mihajlović, Besnik Mustafaj, Jovan Hristić. La 16an de majo 2006 en la librovendejo *Helikon-Vitoŝa* en Sofio en ĉeesto de gastoj el pluraj balkanaj landoj estis prezentitaj dek novaj libroj de la biblioteko de jenaj aŭtoroj: Andreas Stajkos, greka, Izmini Kapandai, greka, Yannis Ritsos, greka, Jevrem Brković, montenegra, Ana Blandiana, rumana, Miro Gavran, kroata, Slobodan Selenić, serba, Dragi Mihajlovski-Pismoto, makedona, Slavko Pregl, slovena, Goran Petrović, serba.

Oni povas konstati, ke la *Balkana Biblioteko* plu estas unika en la balkanaj landoj. En ili mankas sistema prezentado de la verkistoj de ĉiuj popoloj de Balkanio, senescepte pro antaŭjuĝoj. Espere la agado de Grozdev estos imitata!

Dimitar HAĜIEV

Kio estas spiriteco?

Reliĝuloj ofte diras, ke humanistoj neas spiritecon; tiam oni konfuzas spiritecon, kiun posedas ĉiuj homoj, kun religio. Sed ni ĉiuj evoluigas, per spertado, personan perspektivon, kaj ni rajtas nomi tion spiriteco. Kaj humanistoj kaj religiuloj estimas la fenomenon. Sed ofte la homoj supozas, ke „spirita” kaj „religia” estas samvaloraj. Ĉiuokaze „spirita” estas iom malpreciza koncepto.

En Britio eĉ inspektistoj de lernejoj asertas, ke „spirita” ne estas sinonima kun „religia”. Oni ne plu donas difinon ekzaktan al „spirita”. Tion oni povas kompreni, ĉar la vorto havas multajn diversajn signifojn. Ĝi estas aktuala. Oni ofte uzas la vorton, kvazaŭ ĝi havus la saman sencon kiel „religia”. Sed mi opinias, ke religio ofte asociiĝas kun fundamentismo kaj milito, kaj ankaŭ kun persekutoj, subpremado, superstiĉo ktp.

Kiajn spertojn ni, humanistoj, nomas „spiritaj”? Unue, muziko. Ne necesas esti fakulo pri muziko: perfekta modulado dum prezentado en koncerto povas emocii iun ajn. Mi eĉ rekonas tion, kiam mi ludas iujn akordojn de himnoj.

Estas tre malfacile envortigi tiujn spertojn; se oni faras tion, la sperto fariĝas nur memoro. Dum la pasinta jarcento multaj homoj ĝuis kvazaŭ spiritalajn spertojn eĉ en kinejo.

Ni rigardu la naturan mondon; ni ĉiuj kontemplas la mirigan mondon, ĉu la komplikajn rapidecon de etaj kreitoj, ĉu la vastecon de la nokta ĉielo.

Imagopovo apartigas nin, homojn, de la bestoj. Foje la tre konata humanisto Fenner Brockway priskribis staton, kiun multaj homoj rekonas; li staris apud la maro dum sunsubiro kaj priskribis spiritalan aferon: „Mi absorbiĝis en la belecon de la vidaĵo ... mi miksiĝis kun la spirito de la maro kaj ĉielo ... mi miris pri la steloj ... mi sentis min esti pli ol individuo; la vivo de ĉio estis interne de mi kaj ĉirkaŭ mi.”

Estas signife, ke oni ofte trovas tian spiritecon, kiam oni estas sola. Spiritaj spertoj ankaŭ ofte ŝajnas melankoliaj, ekzemple ĉe muziko, kiu estas tiel perfekta, ke ĝi estas iel trista.

Supozeble Brockway sciis pri la sentoj de Matthew Arnold, kiujn tiu esprimis en la rimarkinda poemo *Dover Beach*: „La maro estas serena ĉi-nokte ...”. Poemo povas afekcii spirite. La spertoj de Brockway estas parte este-

tikaj („mi absorbiĝis ...”); la dua parto esprimas ion alian ol la okupata tago („mi sentis min esti pli ol individuo ...”), kaj en la tria parto li imagas sin mem kiel parton de la evolua procezo („la vivo de ĉio ...”).

Humanistoj estas speciale senantaŭjuĝaj pri spiritaj spertoj, ĉar ili estas sentemaj pri mortemo; niaj mensoj koncentriĝas je tiu ĉi vivo kiel la sola vivo. Krome, la spirita vivo estas persona; grup-spiriteco, en kulto, estas la rezulto de miljaroj da prahistorio, kiam homoj loĝis en tribaj komunumoj. Nuntempe ni ĉefe vivas per efemeraj renkontoj; ni ankaŭ havas fremdulojn en „skatolo” en niaj loĝoĉambroj; ĉiuokaze, ni vivas en artefarita medio.

Do, kio estas spiriteco? Nur momentoj de emocio, memoro kaj imago, kiuj donas al ni apartan konscion. Spiriteco estas laŭokaza sperto. Ĝi ne povas esti bazo por konstrui kredosistemon.

En tiu senco oni uzas la vorton bagatelige por priskribi ion plaĉan depende de diversaj cirkonstancoj. Ne povas ekzisti „spirita vivo”; spiriteco estas rezulto de ekzaltaj, sublimaj momentoj travivitaj.

W. H. SIMCOCK

Metio kaj formo - tradicio kaj progreso



Andelsbuch: la modernstila komunuma centro.

Progreso povas okazi ne nur en metropoloj, sed same en periferiaj regionoj. Imprese pruviĝis tio aŭtune en Andelsbuch, vilaĝo en Bregenca Arbaro, okcidenta Aŭstrio. Ĝi situas en alpa valo, geografie iom fermita, sed kulture vigla kaj malferma. Jam en la pasinteco la kampara loĝantaro, sub la premo de mizeraj vivkondiĉoj, sendis en la mondon lertajn masonistojn kaj konstrumajstrojn, pentristojn kaj aliajn metiistojn, kiuj konstruis la famajn barokajn katedralojn pli-malpli proksime de la Konstanca Lago. La plej fama fariĝis Angelika Kauffmann (1741-1807), artpentristino, filino de tiu preĝeja pentristo, kiu fine de sia vivo, vaste agnoskita, rezidis en Romo, ŝian salonon frekventis la korifeoj de la tiama eŭropa kultura sfero.

Iliaj posteuloj estas metie same talentaj. Ili ne plu devas serĉi sian fortunon eksterlande. Nun oni venas

eĉ el eksterlando por loke admiri kaj aĉeti la diversajn metiartaĵojn. Ekde 1999 la institucio *Werkraum* („Laborejo” / „Produktejo”), ligo de la regionaj

metiistoj, okazigas ekspoziciojn de la plej montrindaj produktoj kun ambicio je mondskala merkato. Specifaj trajtoj estas la ligo al la regionaj krudmateria-

Seĝoprezentado en iama segejo.





FRANZ-GEORG RÖSSLER

*Urnobuloj kun miksmasino.**Premia programo en halego el normaj paledoj.*

FRANZ-GEORG RÖSSLER

loj, precipe ligno, metalo, led, ŝtofo, ŝtono, la daŭrigo de metiistaj tradicioj, la precizeco de la produktoj kaj ties praktika funkcikapablo.

Tamen la produktoj ne montras postrestintecon, sed ja modernecon kun dizajno laŭ la pinto de mondvaste aktuala evoluo. Plej konvinkaj estas iliaj simplaj, klaraj strukturoj kaj formoj. Ili elradias originalecon, modestan noblecon, daŭremon, estetikan kaj materialan valoron, foje eĉ humuron.

Lastatempe okazis en iamaj metiejoj la kvara tia ekspozicio en Andelsbuch kun 98 kontribuantoj, el kiuj oni honoris per laŭdoj kaj premioj ĉirkaŭ la trionon. La ĵurio klarigis sian verdikton en modernstila pavilono el normaj EUpaledoj, portempa centra konstruaĵo de la ekspozicio. Aparte ĝi aprezis la inventemon kaj la ludeman kreimpulson ĉe kelkaj produktoj, la taŭgecon de la materialoj, la precizan aŭ plur-

flankan funkciadon. Tiuj ekspoziciaĵoj nek volas nek povas fariĝi industriproduktoj, sed individuaj ŝatataj vivakompanantoj, kiujn la posedantoj kun ĝojo uzadas.

El inter la multaj tabloj, seĝoj, benkoj, ŝrankoj, librobretoj, vestoj, ŝuoj, ĉiuj kun individuaj trajtoj, elstaris precipe fromaĝoteke kun multaj ebloj dispecigi grandajn regionajn fromaĝo-„radojn”, movebla kurteno por pordegoj el betonaj segmentoj, pendantaj laŭ plasta reto, aŭ ligna staplebla kofro, kiu taŭgas hotelĉambre kiel tirkestoj. Iom makabre impresis la urnobuloj el betono, kiuj enhavas, firme enigite, la cindron de mortinto, haveblaj en diversaj koloroj laŭguste de la postrestintoj. Aldone oni ofertas dignan miksmasinton por cemento kaj cindro.

Sed la valanoj de la Bregenca Arbaro nur flanke kultas la morton. Prefere ili ofertas sian belegan alpan regionon inter la Konstanca Lago kaj la mondfama Arlberg-skipejzaĝo tutjare al turistoj. Altiraĵoj estas la vizitindaj lokoj de la *Käsestrasse* (Fromaĝostrato), atinganta eĉ montopinton super du mil metroj, kie oni gasteje proponas regionajn fromaĝpladojn kaj informas

FRANZ-GEORG RÖSSLER



Fromaĝodisigilo en iama bierkelo.

pri la estiĝo de la loka fromaĝo kaj la kromproduktoj. Somera pluso estas la senpagaj utiligado de liftoj al la montaj altaĵoj kaj aliro al valaj naĝejoj. Krome la vizitantoj multloke povas renkonti la lokan kulturon, el kiu la ekspozicio en Andelsbuch estas nur portempa parto. La venonta ekspozicio okazos post tri

jaroj. Dume oni povas vidi kaj aĉeti la iam premiitajn produktojn en prezento en la najbara vilaĝo Schwarzenberg, naskiĝloko de Angelika Kauffmann kaj intertempe fariĝinta internacie renoma koncerta centro meze de bovinpaŝteja pejzaĝo.

Rita RÖSSLER-BUCKEL

MADAGASKARO

Kino malagasa furoras

Jam delonge malagaso kutimas rigardi filmojn eŭropdevenajn en la franca lingvo. Des pli malbone, ke ne ekzistas ĉi tie studfako pri belarto ĝenerale kaj pri kino aparte. La malmultaj fakuloj pri kino preferas resti eksterlande.

Sed de kvin aŭ ses jaroj kelkaj provoj pri malagasa filmo aperas. Pro la uzado de amatora kameraeto, pro la balbuteco de la verkaĵo kaj pro diversaj problemoj pri financo ne estis altnivela kvalito. Tiam praktikantoj de la luktarto kungfuo enscenigis rakontemon pri venĝo, tion sekvis multaj aliaj produktantoj, kiuj fakis precipe pri krima rakonto. Kaj aperis pli poste komedia filmo. Malgraŭ la malper-

fektco de tiuj produktaĵoj, ili furoras, ĉar ili estas en la malagasa lingvo kaj ili ja montras parton de la loka realaĵo. Plie, simpla spektanto, kiel komparano, tre ŝatas temon pri perforto.

Nun oni povas konstati pliboniĝon kaj evoluon de la malagasa filmo. Almenaŭ se temas pri teknika flanko. Produktantoj iĝas pli profesiaj, moninvestado altiĝas, kaj ili jam kuraĝas lui kinejojn (tiuj ĉi jam delonge fermiĝis pro bankrotiĝo) en la urbocentro, disponas distribuantojn en la aliaj provincoj kaj eldonas filmojn sur viddiskoj.

Neatendita sukceso venas ankaŭ de la malagasa komunumo en eksterlando, kiu tre frandas la malagasaĵajn filmojn. Kelkaj produktantoj jam

trovis merkaton en Francio kaj en la insuleto Reunio apud Madagaskaro. Aliaj aktoroj akiris kunlaborkontrakton kun filmistoj en Tajlando.

Pro manko de veraj profesiuloj nia filmarto ne povas konkurenci en la internacia merkato. Fakte, produktantoj laboras solaj, neniuj loka entreprenistoj emas investi tiukampe, dum la registaro nur observas. Kaj piratoj gajnas pli el vendado de miloj da diskoj.

En la 80aj samsukcesa fenomeno okazis al la malagasa bildstrio. Sed nun tiu lasta restas senvalora memoraĵo en ĉies tirkesto. Kulpas la manko de taŭga kultura politiko.

FIDILALAO Henriel

Tri diskoj kun ses paroladoj de Ivo Lapenna

Imagu muziknotojn de solo-sonato por violonĉelo. Vi tralegas ilin kaj konkludas: interesa. Imagu, ke la saman sonaton vi aŭskultas plenumata de ordinara violonĉelisto per mezqualita muzikilo. Vi aŭskultas kaj komentas: bela. Nun imagu, ke la saman sonaton vi aŭskultas plenumata de Pablo Casals per violonĉelo de Stradivarius¹. Vi aŭskultas, kaj via animo fasciniĝas.

Anstataŭigu la violonĉelon per lingvo+voĉo kaj la ludanton per oratoro: tuj vi komprenas, kial la registritaj prelegoj de Ivo Lapenna ravas la aŭskultantojn, donante al ili intensan emocion.

Antaŭ 20 jaroj mi legis al mia filino Serena (denaska) la tekston de la festparolado de Ivo Lapenna por la 39a UK en Harlema (1954): fama teksto, konata kiel *La kultura valoro de Esperanto*. Ŝi diris: „bela, iomete pompa”. Nun mi aŭdigis al ŝi la registritan prelegon. Kvazaŭ sorĉite, ŝi aŭskultis atente ekde la unua ĝis la lasta vorto – afero nekutima ĉe ŝi – kaj je la fino ŝi diris emociite: „mirinda, konvinka”. Malaperis la pompeco, aperis senrezerva aprobo.

La diferencon klarigas la fakto, ke teksto de oratoraĵo, samkiel muzika partituro, transdonas la konceptojn: ĝi alparolas ĉefe nian maldekstran cerboduonon. Muzikplenumo, samkiel viva oratoraĵo, tuŝas samtempe nian dekstran cerboduonon, tiel aktivigante nian tutan homan sentemon (vidu Claude Piron). Kaj se la ludanto estas Pablo Casals, aŭ la oratoro estas Ivo Lapenna, jen la miriga, emocianta rezulto.

La supran metaforon sugestis al mi la fakto, ke Ivo Lapenna, mem violonĉeloludanto, estis tipa „muzikohomo”: li posedis fortan sentemon pri la muzika, emocia valoro de la homa voĉo. En sia *Retoriko* (1950) li dediĉis 23 paĝojn al tiu ĉi temo. Kaj li disponis pri forta, varma, modulebla, ege espi-

mokapabla baritona voĉo. Tiun ĝian karakteron atentaj aŭskultantoj jam rimarkis kaj substrekis².

Cetere, ni ne forgesu, ke li aldone disponis pri lingvo ege muzikeca. Evidente, la 27-jara Ludoviko estis ne nur lingvogenio – kvankam „amatora” laŭ Prof. Blinkenberg –, sed ankaŭ persono, denaske enhavanta kaŝitan muzikinklino. Pluraj elementoj tion pravas. Pri la fonetika flanko de sia kreaĵo li inspiriĝis ĉefe de la itala lingvo, universale konsiderata lingvo elstare muzika (fakte, la monda muzika terminaro baziĝas sur ĝi). La kristala klareco de la kvin fundamentaj vokaloj kaj de la netaj distingitaj konsonantoj, la foresto de dubaj mezaj-miaŭaj-nazaj-gargaraj-tusaj-kraĉaj sonoj, la varieca takto, liverata de regula akcentado kun ebleco de elizio, la „kaj”, la ofteco de diftongoj „aŭ-eŭ-aj-ej-oj-uj” – ĉio ĉi starigas sonkomplekson eminente muzikan.

Jen kial neesperantistoj, aŭskultinte esperantan paroladon, ofte komentas, ke „ĝi iel similas la helenan” – unu el la plej estetikaj lingvoj, kreitaj de la homaro. Ne senkaŭze ĉiuj provoj plibonigi ĝin fiaskis – ekde la reformpropono de 1894 ĝis la sennombraj Idoj, Esperantidoj, Okcidentaloj, Interlingvoj, IALAOj ktp.

Esperanto naskiĝis jam kvazaŭ-perfekta – malofta okazo en la homa historio (la universala gravito de Newton, la relativeco de Einstein, la nedetermin-principo de Heisenberg ...). Tia lingva ĉefverko meritis sian Casals. Kaj jen aperis Ivo Lapenna.

La muzikaj elementoj de lia parolmaniero estas evidentaj. La pintoj supren, por substreki pivotajn frazelementojn („homoj!”); la diferencaj paŭzoj; la abruptaj malsupreniĝoj al basa gamo por konvinke konfirmi kaj konkludi; la akceloj, kiam analogaj konceptoj sin sekvas ĝis apogeo; la fortaj ŝanĝoj de la voĉlaŭteco ekde susure, por malgajaj aŭ pensigaj imagoj, ĝis laŭtege por indigni aŭ soleni aŭ ekzal-

ti; la taktoŝanĝoj ekde lanta-majesta ĝis torenta-galopa; la tonaloŝanĝoj de majora al minora ... Li majstre utiligas ĉiujn rimedojn de la homa voĉo, tute same kiel majstra violonĉelisto kapablas eltiri el sia muzikilo ĉiujn eblajn esprimojn.

La paroladoj de Ivo Lapenna estas aŭskultendaj ne nur pro la internaj konceptoj – inter kiuj elstaras la „humanisma internaciismo” kaj la „aktiva neŭtraleco”, – sed ankaŭ pro siaj muzikaj sonvaloroj, per kiuj iu ajn aŭskultanto konvinkiĝas pri la elstara valoro de nia lingvo – elpensita de 27-jara junulo kaj enhavanta la tutan aromon de la tuaĝa idealismo. Eĉ iu, kiu tute ne konas la lingvon, povas ilin aŭskulti kvazaŭ koncertojn de klasika muziko.

Jen kial mi aŭdacas konsili vin: se vi deziras influi sur neesperantistajn konatojn, provu aŭdigi al ili pecon de tiuj ĉi paroladoj. La efiko surprizos vin. Tion mi mem plurfoje spertis.

Sen RODIN (Filippo FRANCESCHI)

1. Pablo Casals (1876-1973) – violonĉelisto, inter la plej altaj interpretistoj de la pasinta jarcento, portanto de plej severa, rigora muzik-koncepto. Stradivarius – latinigita nomo de Antonio Stradivari (1644-1737), la plej mond-fama metiisto, neniam superita, de arĉo-muzikiloj.

2. Birthe Lapenna: „Mi komplete raviĝis pro lia belsona parolado, ĝi sonis kiel klasika muziko”; C. Minnaja: „La muzikan talenton li importis ankaŭ en siajn paroladojn”; J.-L. Tortel: „La voĉo de Ivo Lapenna ekfluis kiel monta rivereto, ĝi susuris, viglis, tondris, mildiĝis, ridis”; G. Silfer: „La baritoneco de lia varma voĉo, kombine kun la vasta leksiko kaj perfekta lingvouzo ... certe helpis al la sukceso de liaj paroladoj” – en *Eseoj memore al Ivo Lapenna*, paĝoj 28, 177, 194, 200.

Interlingvistiko por ĉiuj

Promeni tra la padoj de interlingvistiko ĉiam estas minimume kurioza kaj instrua aventuro. Kurioza, ĉar oni per ĝi estas enkondukita en la mirigan historion de homoj, kiuj, ĉu pro pure filozofiaj konsideroj, ĉu pro praktikaj celoj, kreis lingvojn aŭ teoriumis pri ĝiaj diversaj aspektoj kaj eblecoj. Instrua, inter alie, ĉar, se temas pri internaciaj lingvoj, ĝi montras, inter alie, ke tiuj ĉiam varias tra la historio laŭ politikaj kaj ekonomiaj cirkonstancoj (hodiaŭ la angla, morgaŭ ... kiu scias?).

Pro la situacio de parolantoj de Esperanto, tiuj faktoj evidente aperas al ni kiel nenia novaĵo. Tamen al laika publiko, al kiu adresiĝas ĉi tiu interlingvistika verko en sia originala versio (en la rusa), ili povas esti mirigaj. Ja nek interlingvistiko nek Esperanto ĝuas grandan popularecon en la mondo.

Danke al klopodoj de homoj, kiaj Aleksandr Duliĉenko, renoma lingvisto kaj slavisto distingita en 2005 per esplorpremio de la Fondaĵo Alexander-von-Humboldt, interlingvistiko povas ekaperi sur la kultura kaj intelekta horizonto de pli larĝa nombro de homoj. Lia verko celas ĝuste tion, ĉar ĝi estis verkita kiel popularscienca referencilo, en kiu la lingvaĵo estas klara kaj senigita je tro fakaj terminoj, kiel decas en tiaspecaj laboroj. La traduko de Aleksander Korĵenkov prezentas nur malmultajn malgataĵojn, ne ĝenantajn la legadon.

La libron komencas ĉapitro pri la nuntempa „lingva ĝangalo” (kiu daŭre malkreskas pro malapero de lingvoj), sed, malkiel oni povus atendi de interlingvisto, oni ne trovas en tia teksto pri la monda lingva panoramo lingvoekologian diskurson, kiu kondamnas la tiel nomatan „lingvan genocidon” kaj aliajn negativajn socilingvistikajn fenomenojn, ofte politike determinitajn. Anstataŭe, la aŭtoro rimarkigas, ke la „lingva ĝangalo” eĉ pligrandiĝas pro malkovro de lingvoj en mondregionoj,

ankoraŭ ne bone esploritaj. Tio eble iom frustros la atendojn de certa tavolo de la esperantistaro, kiu eventuale povus vidi en tiu ĉapitro bonan okazon por asocii lingvan ekologion al Esperanto.

Malkutime por interlingvistika verko, la temo „poligloteco” ricevas spacon en aparta ĉapitro, kune kun interesa demando pri tio, kiom multe da lingvoj homo povas lerni, demando rilata ne nur al kognio kaj sindediĉo, sed ankaŭ al mono, kiel ni ĉiuj bone scias. Kiel ekzemplon de mirinda poligloteco la aŭtoro mencias, inter aliaj, la italon Giuseppe Gasparo Mezzofanti (1774-1849), siatempe konata kiel „la plej poliglota poligloto”, kiu, laŭ diversaj taksoj, parolis de 70 ĝis 100 lingvojn. Kiom da vero aŭ romantikigo estas en la lingva kapablo de Mezzofanti, oni verŝajne ne scias, sed mirindaj kazoj de poligloteco ja ekzistis kaj ekzistas, malgraŭ tio, ke ili estas esceptoj, ne reguloj. Tiu fakto, tio estas, la ĝenerala neebleco lerni tiom multe da lingvoj por profunde komunikiĝi internaciskale jam konsistigas unu el la multaj argumentoj por adopto de pli demokratia komunikrimedo, kio igas utila la pritrakton de poligloteco en la verko.

Kompreneble enestas prezentoj de diversaj skizoj de artefaritaj lingvoj aŭ artefaritaj lingvoj mem. De interslava projekto de la kroat-devena Juraj Križanić, ne tre konata en interlingvistiko, ĝis post-esperantaj projektoj,

En la serĉado de la mondlingvo

aŭ interlingvistiko por ĉiuj

Александр Дуди́ченко
 Поиск языка...
 или интерлингвистика для всех
 1. Введение
 2. Современное состояние лингвистики
 3. Искусственные языки
 4. Естественные языки
 5. Заключение


Aleksandr Duliĉenko

Serie Scia, Volumo 1

kiel *Latino sine flexione*, *Novial* kaj aliaj, la leganto konatiĝos kun kelkaj iliaj karakterizaĵoj kaj estos incitita en nociojn, utilajn por kompreno de bazaj interlingvistikaj tekstoj: „apriora”, „aposteriora”, „naturalisma”, „skema” ktp. Ĉio tio en alirebla lingvaĵo kaj sen tre precizaj fontindikoj aŭ piednotoj, kio stampas la tuton per leĝera koloro, malgraŭ la seriozeco de la temo.

Parenteze, pro la naturo mem de la zorgoj de lingvo-proponintoj, estas facile trovi ĉe ili misiisman komponanton, nemalofte esprimitan per patosa kaj bombasta lingvaĵo limanta la komikon. Se la zamenhofaj paroloj ŝajnis al la francoj de la 19a jarcento, enradikiĝintaj en la tradicio de senkompromisa raciismo, danĝere emociaj,

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,



**Frankrijklei 140,
 B-2000 Antwerpen, Belgio.
 Tlf. + 32 3 234 34 00; tlk. + 32 3 233 54 33;**

**rete: retbutiko@retbutiko.net;
 skajpe [fel-monato](https://www.fel-monato.net)
 aŭ per www.retbutiko.net.**

ekstravagancaj ŝajnas al ni la vortoj de Aleksej Kovaljov antaŭparole al sia *Lernolibro de internacia-sciencia lingvo* (1912), reprenitaj en la 12a ĉapitro: „Mi staras meze de la ŝprucanta turbulo de la vivo, atente rigardas al homaj vizaĝoj kaj alvokas ... (...) Mia animo soifas kuniĝi kun vi, mia brakumo estas malfermita por nia renkontiĝo ... Mi kreis lingvon, rimedon pro viaj rilatoj kun la mondo, simbolon de senĉesa antaŭenirado de la homa socio ...”. Indus iam priexplori la historion de ideoj pri la universala lingvo el psikologia vidpunkto.

Flanklasante tian, ni diru, anekdotan flankon de la historio de la universala lingvo, ni plu menciuj etapojn de la vojo de Duliĉenko en lia libro: li jen pritraktas, jen nur tanĝas diversajn aliajn demandojn, kiel revivigo de lingvoj (la hebrea kaj, certasence, la latina), socia reguligo de lingvoj, piĝinoj kaj kreoloj, ideogramoj, pazigrafioj k.a. Je la fino la aŭtoro formulas kvin ĉefajn (eblajn) vojojn de la apero de la komuna lingvo: 1) per promociiĝo de unu aŭ kelkaj (etnaj) lingvoj al rolo de komuna lingvo; 2) per tutmonda kunfluiĝo de etnaj lingvoj; 3) per kreado de tutmonda lingvo etne neŭtrala; 4) per tekniko (komputila teknologio); 5) per kombino de la suprecititaj vojoj. En la prognozata unua vojo (promociiĝo de etnaj lingvoj), malestas komentoj pri ĝiaj eblaj sekvoj sur la monda lingva bildo. Ne nur pro tio, sed ankaŭ pro foresto de pli kritika diskutado en aliaj ĉapitroj, oni ricevas la impreson, ke Duliĉenko vidas tiujn lingvajn procezojn tra rozkolora prismo (ekzemple, li nur preterpase mencias leĝojn pri lingvoprotektado). Eble tiaj mankoj ŝuldiĝas al postuloj pri tempo aŭ dimensioj de la libro, sed se bilanci la tuton, la fina saldo estas tre favora ne nur al la ĝenerala publiko: al interlingvistoj, ĉu amatoraj, ĉu profesiaj, la recenzita verko sendube alportas signifan kontribuon.

Reinaldo Marcelo FERREIRA

Aleksandr Duliĉenko: *En la serĉado de la mondlingvo*. Tradukis el la rusa Aleksander Korĵenkov. Eld. Sezonoj, Kaliningrado, 2006. 159 paĝoj, broŝurita. Sen ISBN.

Prezo ĉe FEL: 15 EUR + afranko.

Resume de l' mio

Malto estas malgranda lando, pri kies ekzisto eŭropanoj apenaŭ konsciis, kaj scivole interesiĝis pri ĝi okaze de la alveno de la mediteranea insulo en la Eŭropan Union. La Esperanto-movado, tamen, naskiĝis en Malto jam en la plej unuaj jaroj de la dudeka jarcento, samtempe kun la movado en Italio kaj Anglio. Maltanoj fieris pri ĉi tiu tre frua ĉeesto en la internacia etoso: la unuaj grupoj en Msida kaj en La-Valeto estis fonditaj en 1903. La movadon ĉefe starigis kuracisto Gustav Busuttil, esperantisto ekde 1903, numero 8831 de la zamenhofa adresaro, reprezentanto de la malta esperantistaro en Bulonjo kaj tie elektita en la Lingvan Komitaton, en kiu li membris ĝis sia morto en 1928. Alia tre frutempa kunulo estis apotekisto Arkanĝelo Agius; tre agema propagandisto estis farmaciisto kaj notario Aŭgusto Levanzin, numero 12925 de la zamenhofa adresaro, kiu instruadis la lingvon en diversaj vesperaj kursoj kaj starigis plurajn Esperanto-grupojn. Levanzin poste transiris al Ido ĉirkaŭ 1912-1913, kvankam samtempe li ankoraŭ instruis Esperanton.

La unua malta esperantisto, se tiel nomi personon, kiu lernis aŭtodidakte la lingvon kaj tute ne partoprenis la movadon, estis la nacia poeto, pastro, poste monsinjoro, Dun Karm (pseŭdonimo de Carmelo Psaila), kiu verkis diversajn poemarojn antaŭe en la itala, poste en la malta kaj ununuran mallongan poeziaĵon en Esperanto, *Penso printempa*, datitan jam la 1an de aprilo 1901. Li neniam membris en Esperanto-grupoj, sed multegajn jarojn poste, en 1961, renkontiĝis kun membro de la Malta Esperanto-Societo kaj mem donacis kopion de sia poeziaĵo.

La fadenon de ĉi miksitaj poezio itala, malta, Esperanta plene daŭrigas la sanitara inspektoro Carmel Mallia, nun 78-jara, kiu per la nuna verko atingas sian kvaran poemlibron. Mallia akiris meritojn ankaŭ en la historia kampo: li verkis tre kompetente dokumentitan artikolon, *Historio de la Esperanto-movado en Malto*, aperintan en la *Eseoj memore al Ivo Lapenna* (2001), kaj nur al li ni ŝuldas la elementojn, konatajn pri tiu temo. Redaktoro kaj tradukinto de la *Antologio de Maltaj poetoj*, li fondis en 1986 kaj redaktis dum kvar jaroj revuon pri la malta poezio, kiu estas daŭre aperigata de la Societo de la Maltaj Poetoj, kaj ankaŭ duan, kiu vivis tri jarojn. Verkinto en la malta de libro pri Zamenhof, inspirita de la bio-

Malto: La Valeto



MAXIMILIAN BÜHN

grafio verkita de Boulton, tradukinto en la maltan de la *Zagreba kurso* kaj de la Sekelj-verko *Kumeŭaŭa*, verkin-
to de eseo pri la paraleleco inter Dun
Karm kaj Zamenhof, aperinta en *Klaro
kaj elasto*, la festlibro por Fernando de
Diego aperinta ĉe Iltis en 2003; verkin-
to de studo pri la spirita itinero de Dun
Karm (2003), tradukinto el la malta de
la eposo *La Malta Epopeo* de V. M.
Pellegrini, Mallia estas prave hono-
ra membro de la Societo de la Maltaj
Poetoj. Preskaŭ nur li peris al la espe-
rantlingva publiko la maltan kulturon,
apenaŭ konatan ekster la insulaj rifo-
j, kaj estas honoro por la Akademio de
Esperanto, ke tiel elstara personeco
membras en ĝi jam de 1995.

La nuna poemaro montras pli inti-
man inspiron kompare kun la antaŭaj
verskolektoj. Kvankam plejmulto ne
havas daton (kelkaj poemoj indikas
jaron 2004), la plej granda parto estis
verkita en la lastaj du-tri jaroj. Poeto
ĉiam akravida, sed kun iom distanca
rigardopunkto. Kelkio respektas la tra-

diciajn strofojn, sed pluro estas vere distre verkita, kun nefiksa, tamen preskaŭ
abrupte aperanta, rimo, kaj kun ondanta ritmo: Mallia vere eksidis kaj „paŭze
manĝetis”, kiel li mem konsilas al persono, kies pensoj zigzagis, kaj verkis, kiel
li mem diras, „resumon de l’ mio”. Ne ĉio facilas ĉe unualega kompreno: pensoj
kelkfoje kirliĝas ŝajne senfadene. Temas pri momentaj impresoj, pri postkurataj,
eĉ ni diru postflugataj, pensoj, malprecizaj, malnete konturitaj; ne gravas, poezio
estas ĝuste por esprimi liberon:

*Kiam la suno malaperos kaj noktiĝos,
kiam neniu sono bruos kaj neniu vizaĝo serpentumos tra la stratoj,
sciu, ke foriris ulo por ripozi
kaj liberi for de la naŭza etoso de fermitaj pordoj.
Ne grumblu, ne malesperu,
ĉar la vivo senfinos
ĉiam ŝanĝiĝanta en ion novan.*

Mallia sentas sin jam alveninta al la konkludo de la vivo, do li rajtas rigardi
serene al la pasinto, tamen ankoraŭ kun malfermiteco ankaŭ al la estonto:

*[...] mi klopodas naĝi
ĝis la morgaŭa tempesto-furoro
kiu post rapida hajlo – kaj vento-blovminaco –
kvietige silentigos
miajn hieraŭon kaj hodiaŭon.*

Aŭ, eĉ pli klare:

*Foriras lante mi sur remboato
kiel nubet’ senzorga trans la bluo
[...]
Zigzage-rekte, certa aŭ dubema,
mi remas tra la ŝtormo, tra l’ sereno;
nenio min timigas aŭ forĉasas;
min ĉarmas la forir’ liber-senskema.*

Mallia alproksimiĝas al la japana poezio per kvindek hajkoj kaj kvin-
dek tankaĵoj, montrante plenan kapablon kompaktigi en malpli ol dudek
silaboj impreson, maksimumon, humuron:

*Ĝis la revido
certe en eterneco
post tera mito*

aŭ

*Eĉ Paradizo
kverelas kun Infero;
kie la krizo?*

Mallia ne estas regula
vizitanto de kongresoj, tial
liaj humuro, ĉarmo kaj mo-
desteco ne estas tre kona-
taj de la vasta publiko. Do
tre bonvena estas lia nuna
verko, kiun ornamas kel-

kaj trafaj ilustraĵoj, kaj el kies dorsa
kovrilpaĝo salutas nin lia rideto.

Carlo MINNAJA

Carmel Mallia: *Distre-libere*. Eldonis Malta
Esperanto-Societo, 2005. 68 paĝoj broŝuritaj.

Ankoraŭ ne havebla ĉe FEL.



Avidaj piratoj defendas justecon

Mi pensas, ke la sekva logika enigmo diras al ni ion pri demokratio.

Cent raciaj kaj avidaj piratoj devas dividi trezoron inter si, kaj ili uzas la sekvan metodon. Unue la plej aĝa pirato proponas dividon, kaj ĉiuj voĉdonas por aŭ kontraŭ tiu propono. Se ne estas plimulto kontraŭ la propono, ĝi estas akceptita kiel la definitiva divido. Alie, oni mortigas la proponinton, kaj la plej aĝa restanta pirato devas proponi dividon, kaj tiel plu. Kiun dividon proponu la plej aĝa pirato?

Estas facile solvi la enigmon, se oni unue solvas ĝin por unu pirato, poste por du piratoj, poste por tri piratoj, kaj tiel plu. Se estas nur unu aŭ du piratoj, evidente la plej aĝa pirato prenu la tutan trezoron; ne estos plimulto por voĉdoni kontraŭ la proponinto. Se estas tri piratoj, la plej aĝa povas rezoni jene: se mia propono estos malakceptita, la due plej aĝa prenos ĉion; tial, sufiĉas donaci unu groŝon al la plej juna pirato, por ke li subtenu mian proponon. Do la plej aĝa pirato proponas doni unu groŝon al la plej juna kaj la ceteron al si mem. La plej juna sub-

tenas la proponon, kaj la meza pirato ricevas nenion.

Se estas kvar piratoj, la plej aĝa rezonas jene: se mia propono estos malakceptita, la due plej aĝa proponos doni unu groŝon al la plej juna kaj la ceteron al si mem, kaj tiu propono estos akceptita; tial, sufiĉas doni unu groŝon al la trie plej aĝa pirato, por ke li subtenu mian proponon. Do la plej aĝa pirato proponas doni unu groŝon al la trie plej aĝa kaj la ceteron al si mem, kaj la propono estos akceptita.

Daŭrigante tiel, oni vidas, ke la solvo de la enigmo pri cent piratoj estas jena: la plej aĝa proponas doni po unu groŝon al piratoj 3, 5, 7, ktp, dum la ceteron ricevas li mem. Tiuj, kiuj ricevas ion, subtenos la proponon, kaj la propono estos akceptita, ĉar duono de la piratoj voĉdonos jese.

Ĉu vere el tia enigmo oni povas konkludi ion pri la vera mondo? Kompreneble, ne rekte. En la enigmo temas pri simpla kaj ideala situacio, dum la vera mondo estas multe pli komplika. Tamen, se avido, racio kaj demokratio logike kondukas al tia maljusteco en simpla, teoria situacio, estus strange

kredi, ke la samaj faktoroj kondukos al justeco en la vera, kompleksa mondo.

Kaj fakte la solvo de la piratenigmo havas analogion en la vera mondo. Vidu, kion proponas la plej aĝa pirato: li donas iomete da mono al duono de la piratoj kaj kvazaŭ diras jene: „Vi, kiuj ricevas iomete da mono, voĉdonu por mi, ĉar se vi ne voĉdonos por mi, same avida homo min anstataŭos, kaj tiam vi eble ricevos tute nenion.”

Politikisto en demokratia lando povas agi simile: li nur devas konvinki iomete pli ol duonon de la balotantoj, ke ili estas iomete pli riĉaj sub lia regado ol sub la regado de alia, same avida politikisto de alia partio, kaj tiuj balotantoj volonte subtenos lin, malgraŭ tio, ke la politikisto prenas preskaŭ ĉion por si mem.

Mi tezas, ke ĝuste tio neeviteble okazas en demokratia lando kun tradicia balotsistemo, se homoj kondukas avide kaj racie – kiel ekonomikistoj ja volas, ke ili konduku!

Sed vidu la ironion: oni apenaŭ povas imagi, ke tioma maljusteco okazus inter veraj piratoj. Veraj piratoj ne estus sufiĉe raciaj. Se ilia ĉefo proponus tian maljustan dividon, ili kolerus; ili ignorus la regulojn kaj eltrus siajn glavojn.

Bedaŭrinde, al la civitanoj en tipa „demokratia” lando mankas la pirata spirito, kaj mankas al ili ankaŭ glavoj. Ili ŝafe obeas la regulojn kaj akceptas maljustecon, timante pri la propraj kapoj, aŭ eble rezonante: „Nu, ni ja voĉdonis, kaj tiu partio venkis, do ni devas nun akcepti ties regadon.”

Se la tezo estas ĝusta, eble la sola maniero certigi justecon estas, ke almenaŭ kelkaj homoj estu malraciaj, koleremaj kaj armitaj. Hodiaŭ oni (mis)nomas tiujn homojn „teroristoj”. Tamen, mi proponas, ke ni salutu ilin kiel la gardantojn de justeco.

Edmund GRIMLEY EVANS

Hodiaŭ oni (mis)nomas tiujn homojn „teroristoj”. Tamen, ni salutu ilin kiel la gardantojn de justeco



ANONCETOJ

Kvakeroj kredas sendogme, ke al ĉiu homo eblas senpere trovi gvidon el dia fonto, kaj kunvenas en silento por kune inspiriĝi. Kvakera E-Societo aranĝas renkontiĝon en Poznań, Pollando, 28 - 30 majo. Interesiĝantoj bonvenos. Inf. ĉe www.kveker.org/kes_kes.htm aŭ bmaurus@amu.edu.pl aŭ letere al Esperanto - KES, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo.

Akademio ĉe la plaĝo: SUS 30 de AIS San-Marino okazos komence de septembro 2007 en marborda urbo Rimini (Italio). Bonvenas ne nur sciencistoj kaj studentoj, sed ĉiaj interesuloj. Detaloj: www.ais-sanmarino.org -- klaku al "Anonco pri SUS 30".

Fantomo hantas tra l' mondo. 16-a konferenco por (eks)komunistoj en Dobrichovice, Ĉeĥio, 2007/09/12-16. Aliĝilojn mendu ĉe Dieter Rooke, Äussere Klus 14, CH 4702 Oensingen. Rete: IKEK2007@gmail.com.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provezemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR
30 USD
aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

OSIEK-Konferenco 2007

Pazarĝik, Bulgario, 14a-20a de julio

MITOJ KAJ LEGENDOJ

Atribuado de OSIEK-premio 2007

Postkonferencaj ekskursoj dum 3 tagoj

Informoj, aliĝoj:

- Georgi Mihalkov (Julian Modest)
tel.: (02) 934-42-55 retp.: modest@abv.bg
- Eric Laubacher
tel.: + 33 1 30 96 67 91 retp.: kasisto@osiek.org




<http://osiek.org>

Aperis du noveloj de la afrika aŭtoro Jean Codjo:



La paŝo senelirejen: La unua verko de Jean Codjo, kiu rakontas la unuan kontakton de sia vilaĝo kun la okcidentaj kulturigontoj ... Neteoria trakto, tamen tre inspira!



Dialogo inter surduloj: Dua verko de la benina aŭtoro, pri la malfacileco de komunikado inter kulturoj. Civilizita nigra blankulo prelegas, sub la baobabo, al siaj samtribanoj. Ili aŭskultas sed ne aŭdas ...

Prezo: po 6 eŭroj + afranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendisto.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be